

lupidoj el
Bombay kuiras

# LA SKOLTA MONDO

Volumo 4. Numero 24.
kvara Jarkvarono 1974.

**S ☆ E ☆ L**

Fondinto: "Avoto".
Kunfondinto: J.W. Leslie.

Honoraj Prezidantoj:
Avoto, Norman Booth, D. H. Davis, L.J. VanGulck.

Prezidanto: John Berggreen, Brattvollveien 23c, Oslo 11, Norvegujo.
Telefono 02-283035.

Sekretario: J. K. Hammer, Taxusstraat 7, Zaandam, Nederlando.
Poŝtkonto 632246.
Telefono 075-166931.

Kasisto kaj Administranto de "La Skolta Mondo": David H. Withey, 21. Brookfield Avenue, Waterloo, Liverpool L 22 3ye, Britujo.
Telefono 051-928-2936

Redaktoro: Hans Amund Rosbach, Nergata 37c, N-6500 Kristiansund N, Norvegujo.
Poŝtkonto 8030413.
Telefono 072-77620.

Membro de Centra Komitato

Ŝindo -Seitaro, Nisimikuni 1- tyôme 200, Higasi - yodogawa - ku, Osaka-si, Japanujo.

La Skolta Mondo aperas kvarfoje en la jaro.

Okaze de nericevo, bonvolu informi la Nacian Reprezentanton aŭ la Administranton.

# Mi petas

pardonon kaj komprenon! Mi tute bone konscias, ke tiu ĉi numero - la kvara de 1974 - verŝajne estos la unua de 1975. Ĉar jam estas decembro dum mi ekpreparas la numeron, la kristnaska plimulto de laboro donos malfruiĝojn de presejo, kaj la poŝto havas siajn limdatojn. Do.
Sed la ĉefkulpo nepre estas mia.

Mi havis tro multon por fari. Pro la vakaj oficoj mia kolego kaj mi devis fari duoblan laboron. Krome ni havas ĉe mi preĝejan jubileon, kun la koncernaj preparoj.

I.a. ni havos novan orgenon en nia preĝejo. La jubilea tago estos la 15a de decembro. Per libervolaj helpantoj ni malkonstruis la malnovan, ne plu uzeblan orgenon (Kia laboro! I.a. ni kolektis plenan sitelon da ŝraŭbiloj el plej variaj grandecoj). Kaj poste ni atendis.

La 25an de novembro ankoraŭ ne estis plej eta signo de nova orgeno sur la preĝeja galerio. Tri semajnoj restis - kredu, ke kriblis niaj stomakoj!

Sed eĉ tio ordiĝos, kaj ni havos la festdiservon, la jubilean koncerton kaj la buterpanan kaj kafan regalon - en apuda preĝdomo.

Kaj poste venos la kristnasko. Ankaŭ ĝi grava labortempo por pastro, kun grava prepara laboro.

Tial mi petas vian pardonon kaj komprenon.

Samtempe mi sendas al vi ĉiuj miajn plej korajn salutojn okaze de kristnasko kaj novjaro, kaj deziras al vi Dian Benon! La malnova profetaĵo de kristnasko: PACON SUR LA TERO fariĝu realaĵo, ne nur en la koroj de fidantoj, sed ankaŭ en la konfliktoplena mondo.

Kaj mi dankas al tre multaj skribintoj pro bonaj vortoj, alsenditaj poŝt-markoj, bondeziroj, kuraĝigoj ktp. Mi ne povas respondi al ĉiuj leteroj sed vere, vere ĝojas.

Via

Hans Amund



Nia Prezidanto:

# NI ESTU FIDELAJ AL NIAJ IDEALOJ

Karaj SEL-anoj!

En mia novjarsaluto al vi ĉifoje mi ŝatas memorigi vin pri la skoltaj idealoj. Mi ja bedaŭrinde devas konstati, ke la hodiaŭa mondo tro multe sin okupas pri materialistaj aferoj. Regas multloke malfido kaj eĉ malamo al aliaj homoj. La junularo kritikas la plenkreskulojn kaj la pli aĝa generacio ne komprenas la junulojn. Ili evidente ne parolas la saman lingvon!

Mi ne volas doni analizon pri tiu fenomeno kaj nur konstatas la malfacilaĵojn tiurilate. Sed mi rajtas demandi: Ĉu la kaŭzo (aŭ unu de la kialoj) al tiu malagrabla situacio povas esti manko de idealoj, ne nur flanke de la junularo, sed ankaŭ ĉe la pli aĝaj homoj? En la nuna tempo plenplena de streĉaj okazintaĵoj kaj tro forta vivmaniero la ĉiam kreskanta influo de seniluziitaj homoj povas signifi danĝeron por la edukado de la junularo. -

La kreinto de Esperanto - aŭ la inicianto, kiel Zamenhof mem nomis sin - iam skribis jene: "Rigardu la homaron kiel unu familion. La junularo devas esti edukata al batalantoj por vereco, boneco, ĵusteco kaj frateco."

Ĝuste la samajn idealojn havas la skolta movado, kaj tial la du mondorganizaĵoj devas kunlabori por realigi tiujn idealojn. La fondinto de la skolta movado Baden-Powell mem taksis la fratecan ideon kiel bazon kaj ĉefcelon de la skoltaro. - Persone mi opinias, ke ekzistas en la mondo certaj vivleĝoj eternaj. Peko al tiuj signifas stagnon aŭ malkreskon en la strebado de la homoj por pli-bonigi la vivkondiĉojn de la homaro. Male persista kaj sindona laboro laŭ tiuj leĝoj signifas potencan paŝon en la ĉiama lukto por antaŭenpuŝi pli harmonian socion por ĉiuj popoloj.

Kiamaniere la unuopaj membroj de SEL povus kontribui al la realigo de tiaj idealoj? Nu, mi ne havas la solvon, sed mi apelacias al vi ĉiuj energie kaj nelaciĝante laboru por konservi kaj alte taksi niajn skoltajn idealojn.

La homaro de hodiaŭ bezonas idealojn - eble eĉ pli multe ol iam antaŭe - kaj ni skoltesperantistoj kunhelpu laŭpove en la komuna bela lukto!

Fine mi rakontas al vi veran historion pri fideleco al idealoj, ĉar fideleco ankaŭ estas treege bezonta bonkvalito hodiaŭ:

En la "or"-jubilea memorlibro pri SEL eldonita en 1968 de nia antaŭa prezidanto F. Douglas Murphy, estas menciitaj sur paĝo ses 4 nomojn de norvegaj skoltesperantistoj (laŭvice en la libro): John Berggreen, Kjell Lie Offerdal, Lars Kåre Hunnes kaj Hans Amund Rosbach. Ili fariĝis membroj de SEL antaŭ la 2-a mondmilito (aŭ tuj poste). Ni retrovas la 4 tiamajn skoltknabojn 20 jarojn poste (en 1965) kiel prezidantoj de la Esperanto-kluboj en la 3 plej grandaj urboj de Norvegujo (Berggreen en Oslo, Offerdal en Bergen kaj Hunnes en Trondhejm) kaj Rosbach kiel redaktoro de nia organo La Skolta Mondo. Ankoraŭ 10 jarojn poste ili restas fidelaj esperantistoj kaj memoras la skoltan devizon "Iam skolto, ĉiam skolto"!

Al vi ĉiuj en SEL mi sendas korajn salutojn, BONAN NOVJARON 1975!

Leciono 3.

La sekreta kodo, la ĉifro de la matematikistoj.

Angulo A egalas al angulo D,
Angulo B egalas al angulo E, ) el tio sekvas ke triangulo ABC estas samforma kiel triangulo DEF estas skribita en la kodo de la matematiko tiel :

bildo 3.


$$\left.\begin{array}{l}\angle A = \angle D \\ \angle B = \angle E\end{array}\right\} \Longrightarrow \triangle ABC \backsim \triangle DEF$$

Leciono 4.

Se du trianguloj estas samformaj, tiam ekzistas rilato inter la lateroj.

Tiel : AB : BC = DE : EF

au eble vi pli bone komprenas la rilaton tiel : $\frac{AB}{BC} = \frac{DE}{EF}$




bildo 4.

Kaj se vi jam lernis ion pri matematiko vi eble scias ke ni povas skribi tion ankaŭ en la formo de matrikso, tiel $\begin{pmatrix} AB & DE \\ BC & EF \end{pmatrix}$

Kiel ajn vi skribas la rilaton, tio signifas ke ĉiam validas :

$$AB \times EF = BC \times DE$$

Ankaŭ se la bildoj aspektas kiel la bildoj 2b kaj 2c, la sama rilato ekzistas !

Bone lernu ĉi tiun utilan lecionon !

Leciono 5.

Ekzemplon mi donas al vi !

Jen du samformaj trianguloj $\triangle ABC \backsim \triangle DEF$


AB=5cm, BC=7cm, DE=20 cm.

Kiom longa estas EF ?

Solvo: $AB \times EF = BC \times DE$

$$5 \times EF = 7 \times 20$$

$$EF = \frac{7 \times 20}{5} = 28 \text{ cm.}$$





bildo 5.

Tion ni uzos por mezuri altecojn!

Leciono 6.

Mezuri per krajono. Tenu la brakon tute rekte, kaj "mezuru" per via krajono, kiom alta estas la arbo.

Via brako = AB, la krajono = BC, la distanco ĝis la arbo estas DE, kaj la ekzemplo kiel kalkuli estas en leciono 5 !





bildo 6.

Leciono 7.

Mezuri per la ombro. Kiam la suno brilas, la sunradioj faros la du triangulojn , kiujn vi bezonas.

Metu bastonon vertikale en la tero, kaj mezuri ĝian ombron. Ankaŭ mezuru la ombron de la altaĵo.


La bastono = BC, ĝia ombro = AB. La altaĵo = EF, kaj ties ombro = DE. Por la resto : vidu leciono 5.




bildo 7.

Leciono 8.

Por la antaŭa metodo vi bezonis la sunon. Por la nuna metodo vi bezonas la pluvon. Aŭ almenaŭ la flakojn, kiujn la pluvo faras sur la stratoj.




Mezuru la distancon inter flako , kaj la subo de la turo ( = DE ) , promenu malantaŭen ĝis vi vidas la rebrilon de la pinto en la flako , tiu distanco estas AB, kaj la alteco de via propra okulo estas BC . Por la resto : vidu bildon 2c, kaj ekzemplon 5.


Se la turo estas dika, vi mezuru la distancon DE se eble ĝis la mezo de la turo. Se vi uzas spegulon, anstataŭ flakon, vi eble faros malbonan kalkulon, ĉar vi ne havas garantion ke la spegulo estas absolute horizontale !


bildo 8.

Leciono 9.


Nun ni kontrolos la larĝecon de kanalo aŭ rivero. Por tio vi tamen bezonas terenon, kiu estas sufiĉe vasta, kaj kie vi povas rigardi libere. Tre ofte ĉi tiu metodo ne sukcesos ĉar la necesa libera , kaj ebena loko mankas al vi. Sed feliĉe, ekzistas ankaŭ aliaj metodoj !


Iru laŭ la kanalo, ĝis kiam facila trovebla objekto, arbo aŭ domo, estas tuj kontraŭ vi. Tio estas linio EF. Nun promenu ĝis ia loko, ĉe la bordo, kaj tie vi metu bastonon (D). (Eble jam ia objekto , kiun vi povas uzi, estas tie !) Promenu iom pli, ĝis kiam vi faras ortan angulon, kaj promenas fór de la kanalo (AB)
Nun promenu for de la kanalo, ĝis kiam vi vidas la bastonon A kaj la unuan objektonF en unu linio.




10a. b. c.. d.




bildo 9.

Leciono 10.

Kiam vi ne povas mezuri la altecon PR, vi tamen eble povos mezuri la distancon AB. Tio donas al ni novan manieron por mezuri altecojn. Vi "faligu" la arbon ! Kompreneble nur en la fantazio !
En la matematiko ni diras: ni rotacias la arbon. Tio signifas :
Ni turnas la arbon.
Notu ke la arbo ne 'falu' for de vi, kiel en bildo 10b, nek en via direkto, kiel en 10c, sed precize flanken, kiel en 10d.

Leciono 11.

Nun ni "rotacios" kanalon !
Sed kanalon ni ne povas "faligi". Ni ankaŭ ne povas uzi krajonon, por montri al vi, kie ĝia pinto falas.
Faru tiel:
Surmetu ĉapelon, kaj rigardu trans la kanalon al la alia bordo.
Staru rekte, kaj nun ŝovu la ĉapelon tiel, ke ĝia rando "tuŝas" la alian bordon.
Nun turnu vin. Nek movu la kapon, nek la dorson, sed nur la piedojn !



La rando de la ĉapelo nun montras sur via bordo, kiom larĝa la kanalo estas !

-o-o-o-o-

Ĉu vi estas kontenta ?
Nun vi iru eksteren , kun krajono kaj iom da papero, kaj rigardu, ĉu tie estas ion por mezuri.
Kaj... mi esperas ke estonte vi iom ŝatas matematikon.

# Kopenhago, 60a Universala Kongreso de Esperanto



1975 07 26 – 08 02

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam -3002, Nederlando.

Adreso de la Loka Kongresa Komitato: Postboks 1503, DK-2700 Brønshøj, Danlando.

**Kongresejo:** La Kongreso okazos preskaŭ senescepte en salonoj de Falkoner Centret, bela kaj lukse ekipita domo ligita al granda hotelo "3 Falke" – kompreneble kun propra restoracio – en la komunumo Frederiksberg.

**Kiel aliĝi al la Kongreso:** Se vi ne havas aliĝilon (formularon presitan sur kolora papero), petu ekzempleron de via landa kongresa peranto aŭ rekte de la konstanta adreso de la Kongreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Ĉiuj ceteraj instrukcioj aperas sur la aliĝilo.

## Nova sekretario de la Belartaj Konkursoj

La Belartaj Konkursoj, kiujn rajtas partopreni ĉiu aliĝinto de la UK aŭ individua membro de UEA, havas novan sekretarion: s-ro Alec Venture, 55 Park Hill, Carshalton, Surrey, SM5 3SE, Britio. La limdato por konkursaĵoj estas la 31a de marto 1975. Detala regularo de la Belartaj Konkursoj aperas en la broŝuro "Statuto kaj Regularoj de UEA", senpage ricevebla ĉe la konstanta adreso de la Kongreso.

## La 31a IJK

okazos en Fredericia, Danlando de la 19.a ĝis la 26.a de julio. Temo: "Kultura interŝanĝo". Adreso por aliĝoj: "Tejo-kongreso 1975", Thunøgade 26-4, DK-8000 Aarhus. La aliĝilo enhavu plenan nomon, adreson, informon pri sekso kaj aĝo, informon pri membreco de TEJO, daton kaj subskribon.

## somera migrado 75


okazos en Berner Oberland, en la svisa montaro, de la 4.a ĝis la 9.a de aŭgusto.
Oni marŝos en la montaro, kunportante la necesajn aĵojn en dorsosako, kaj spertos la vere liberan vivon en la altmontaro.
Skribu al: Svisa Esperanto-junularo, Rue de la Cure 5, CH-2035 Corcelles, Svisujo.

La redaktoro ĝustigas:
Nia N.R. F. Schwarzler estas Komisaro por Internaciaj Aferoj, ne Int. Komisaro por Aŭstrio, kiel ni informis lastfoje. Ni bedaŭras.

Ni ricevis:

Renato Corsetti kaj Mauro La Torre
"Ĉu vi parolas tendare?"

Malgranda kajero kun bildkurso por labortendaroj, eldonita de TEJO. Presmetodo - kiel LSM. Malgrandaj desegnaĵoj de diversaj iloj, kun la nomo en Esperanto. 26-paĝa suplemento kun pli serioza kurso, t.e. kun frazoj, taskoj.



*York Minster*

**Supren!**

La kristana katedralo, la mahometana moskeo, ĉiu konsekrita domo en la tuta mondo igas nin rekti la vidon supren. Supren al Dio.

Estas en tio io tute senpere komprenebla, kvankam ni ja "scias", ke Dio ne loĝas en iu ĉielo tie en la supro. Scias, ĉar teleskopoj kaj astronaŭtoj neniam vidis Dion tie en la supro

Sed ĉu ni scias?

Ĉu ne tamen niaj okuloj sin turnas al la supro, kaj ni streĉas niajn manojn al Dio en la supro, simple ĉar ni tamen rekonas Dion per tiu esprimo?

Tial la turoj, minaretoj k s pravas: Ili igas niajn preĝojn leviĝi al Dio.

Kaj la strebado de la homo devas esti al la supro. Al la lumo. Al la vero. Per ĉiuj niaj fortoj ni provu atingi al la vero. Tiel ni servas Dion - kaj nur tiel.

La kristana fido aldonas: Eĉ se vi ne povas atingi al Dio, Dio povas veni al vi! Kaj tion, diras tiu kredo,




Dio plenumis dum Li lasis sin naski kiel homo.

Kiel bebo!

Tiel Li sanktigis la patrinan sinon kaj la homan familion, la virinon kaj la infanon.

Kaj - rakontas la kristnaska evangelio:

en stalo.

Tiel Dio montras al ni, ke la voje al la supro ne estas tiu, kiu igas nin subpremi aliajn homojn, sed kontraŭe ĝi komencas per la humila volo iri en la stalon - t.e. preti al eĉ plej granda malagrablo por povi helpi kunhomon, kiu bezonas nian helpon.

Tio do estas la kristana evangelio:

Dio venas al ni, ĉar ni ne povas atingi lin. Kaj Li elektas la plej malfortan - la bebon -, la plej malriĉan - la senhejman, kiu serĉas rifuĝon en stalo - la plej humiligan - la eksteredzan -, la plej mizeran - tiun de la rifuĝinto -, por tiel diri al la homoj, ke eĉ la plej mizera, malriĉa, malforta, abomenata homo estas same amata de li, estas same valora al li, kaj ke la eklezio estu hejmo de ĉiu homo.

Tion la apostoloj sciis: "Ne estas ja Judo nek Greko, ne estas sklavo nek liberulo, ne estas ja vira kaj virina; ĉar vi ĉiuj estas unu en Kristo Jesuo."

Ili sciis.

Ni devas scii - kaj vivi laŭ tiu scio.

Haro.

ESTU PRETA

NACIAJ REPREZENTANTOJ:

Aŭstralio: s-ro S.H.Milligan, 14 Kerry Close, Doncaster E 3109, Victoria.

Aŭstrio: s-ro Franz Schwärzler, Rathausstrasse 2, A-6900 Bregenz.

Belgujo: d-ro Eddy Frederickx, Hennepstraat 10, B-2060 Merksem-Antwerprn. Poŝtĉekk 9978.93. Tel(031)4524.76
s-ro L.J.VanGulck, Lt.Lippenslaan 33, B-2200 Borgerhout. Poŝtk.to Belga Skolta Esp.-Sekretario 000-0327460-85. Tel (031)3688.08.

Brazilio: s-ro Euclides C Soares, Av. Almirante Tamarande 979, Belem, Para

Britujo: s-ro C.Bardsley, 42 Westbourne Str., OL9 6AR Oldham, Lancs.

Danlando: s-ro Bjarke Nielsen, Erdalsvej 30, DK-2600 Glostrup.

Finnlando: s-ro Seppo Tella, 9 kp, SF-55950 Imatra 95, tel 954-51130.

Francujo: s-ro Petrick Deveughele, 53 Av.de Rigny, Appt 64, F-94360 Bry sur Marne.

Germanujo: s-ro Georg D. Winkler, Haroldstrasse 47, D-41 Duisburg 1.

Hispanujo: s-ro Pedro Marqueta, F el Catolico 32, 5°izqda, Zaragoza. Tel 252044.

Irlando: s-ro Frank Dobbs, 8 Ailesbury Grove, Dublin 4.

Italujo: s-ro prof. F Tulone, Via Frangipene 8, I-92019 Sciacca, Agrigento. Tel 21.198.

Japanujo: s-ro Sinzo Sumiya, Daido Kagaku Sooti K.K. 16, Suekirotyo Kitatu, Osaka.

Kanado: s-ro John H.F. Hoyle, Box 421, Forest Ont.
Helpa NR: S-ro Paul Ronald, 45, 10th Ave., Roxboro, Queb.

Nederlando: s-ro B.J.Wijmer, De Perponcherstr 118, Den Haag 2004. Tf 852359.

Norvegujo: s-ro H.A.Rosbach. Vidu paĝon 2 sub "redaktoro".

Novzelando s-ro D.B. Pease, Flat 2, 8 Dent Street, Whangarei.

Portugalujo s-ro J.de Matos Correia, Rua Cidade da Horta, Lote Q-5-3°, Pontinha, Lisboa 4.

Svedujo: Peranto: s-ro Ragnar Hjorth, Kronobergsgt 25, S-11233 Stockholm.

Usono: s-ro : Allan Fineberg, 76 Seventeenth Ave, Paterson N.J. 07513.

Zairo: s-ro Paul Deloin Nzemba-Paku, B.P.280, Limete, Kinshasa.

Informoj pri membreco:
En landoj kun Nacia Sekcio: Informiĝu ĉe NR kaj pagu al li la kotizon.

Individuaj membroj (Nur en landoj sen N.R.!) Kotizo inkl. abono:
Junuloj ĝis 18 jaraj: Ned.gld. 3.30 aŭ egalvaloro.
Pliaĝuloj: Ned. gld. 5.oo aŭ egalvaloro.
Subtenantoj: Minimume Ned. gld. 5.oo aŭ egalvaloro.

Adresoj de la Centra Komitato: Vidu la duan paĝon.



Ni iros en la "jaron de la virino". Ĉu la virinoj - t.e. skoltinoj - kantante eniras nian ligon? Ni ĉiuj esperu tion kaj laboru por tio!




# LA SKOLTA MONDO

OFICIALA ORGANO DE LA SKOLTA ESPERANTO LIGO

Limtempo por manuskriptoj kaj anoncoj: 1.a de Februaro, Majo, Aŭgusto kaj de Novembro.

REDAKCIO: N-6500 KRISTIANSUND

NE ISSN 0037-6558




KUL